

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2015

Ĵaŭdon la 15an de januaro

63a jaro

Kalendaro

Atentu: ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Lundon la 19an de januaro (sem. 4) – *mandag*

Interlingvistika studgrupo – vidu la 3an paĝon.: Ni faros komparon inter volapuko kaj Esperanto – la lingvoj mem kaj la movadoj.

Studiegruppe om interlingvistikk – se 3. siden. Vi foretar en sammenlikning mellom volapük og esperanto – språkene og bevegelsene.

Mardon la 3an de februaro (sem. 6) – *tirsdag*

Tradukekzerco. Ni traktos malnetan tradukon de informkajero pri tradiciaj metioj, diskutante malfacilajn vortojn.

Oversettelsesoppgave. Vi bearbejder en grovoversettelse av et informasjonshefte om "små håndkerfag" og diskuterer vanskelige ord.

Lundon la 16an de februaro (sem. 8) – *mandag*

Interlingvistiko: la filozofiaj projektoj de Kartezio kaj Leibniz: Ĉu Esperanto estas ne nur rimedo por facila kaj justa komunikado, sed ankaŭ realigo de la projektoj de la filozofoj pri "perfekta lingvo", kaj pli bona pensilo ol la etnaj lingvoj?

Interlingvistikk: Er esperanto ikke bare et praktisk middel for lett og rettferdig kommunikasjon, men også et svar på filosofenes søken etter "det fullkomne språk", altså et språk som er bedre å tenke på enn de etniske språkene?

Mardon la 3an de marto (sem. 10) – *tirsdag*

JARKUNVENO. Vidu la. 3. paĝon.
+ ev. daŭrigo de la tradukekzerco.

*ÅRSMØTE. Se den 3. siden.
+ evt. forts. av oversettelsesoppg.*

Lundon la 16an de marto (sem. 12) – *mandag*

Kiel helpi entuziasmajn sed malriĉegajn triamondajn E-klubojn? Ĉu sendi librojn? aŭ monon? inviti al UK? interskribi? ĝemeliĝi?

Hvordan hjelpe entusiastiske men lutfattige grupper i det tredje verden? Sende bøker? eller penger? invitere al kongresoj? sendi konsilajn? vennskapssamarbeid?

OKAZIS

Mardon la 4an de novembro

Traduk-ateliero. La temo estis aronio – tiel nomiĝu la grandaj bluaj beroj en Esperanto, ni konstatis, kiujn polaj gastoj konatigis al ni. Ni detale prilaboris malnetan tradukon de artikolo el interreto, kun multaj lingvaj defioj, ankaŭ kelkaj nesolvitaj – *frie radikaler, helsekostprodukter*. Novaj vortoj por ĉiuj estis uretro/uretero, tartrata acido (*vinsyre*) kaj draĵo (*rotskudd*).

Lundon la 17an de novembro

La anoncita programo ne povis komenciĝi antaŭ ol finiĝis la tiutaga partio en la tutmonda ŝakĉampionado, kiun ni sekvis interrete. Kaj ĝi estis la plej longa en la historio de tiu aranĝo. Sed post tio ni povis aŭskulti prelegon de Otto Prytz pri adverboj en Esperanto, precipe pri kelkaj specialaj: *nur*, *ankaŭ* kaj *ne*, kiuj, se eble, staru tuj antaŭ tio al kio ili rilatas: *Ankaŭ mi venos morgaŭ* – do ne nur aliaj homoj. Tion oni ofte ne praktikas en naciaj lingvoj, kun foja rezulta dusenceco: *Jeg kommer også i morgen*. Sed en relativa frazo ne eblas meti ion antaŭ *kiu*, do necesas diri ... *kiu ankaŭ* ...

Mardon la 2an de decembro

Ni konstituis studgrupon pri la artkoloserio en Revuo *Esperanto*

pri interlingvistiko, kaj diskutis la temojn de la tri unuaj artikoloj: difinoj de la termino, klasifikoj de interlingvoj kaj lingvoplanado. Ni ankaŭ konsideris la specialan norvegan lingvosituacion laŭ tiuj ĝeneralaj teorioj.

Lundon la 15an de decembro

La tago de la libro. Ĉeestantoj laŭvice prezentis kelkajn librojn: *Kroze – proze* de Sten Johansson (kun i.a. eseoj pri 10 aŭtoroj de noveloj kaj romanoj originale verkitaj en Esperanto), *La maljunulino Holle* el *Fabeloj de fratoj Grimm*, tradukitaj de Kabe, kaj *Gimnazio* de Ŝalem Aleiĥem, tradukita de Zamenhof el la jida.

Mardon la 6an de januaro 2015

Kiel plivivigi nian klubon en la nova jaro? Ĉu en jaro de komunuma elekto plifacilos havigi komunuman subvencion? Ĉu aranĝi kulturen vesperon dulingvan por la publiko? – kadre de alia kultura organizo? Kiel venigi junulojn en la kluban medion? Ĉu lasi al ili aranĝi kunvenon? – kun aĝlimo??

Kaj por NEL: Ĉu revivigi *Esperanto-nytt* kiel retroŝtan dissendaĵon? Ankoraŭ 16 membroj ne pagis por 2014: Ĉu draste redukti la bazan kotizon por pasivaj membroj, kaj instigi la aktivajn donaci abunde?

Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 3. marto

Tagordo / Dagsorden

- | | |
|---|---|
| 1. Aprobo de la kunvoko | 1. Godkjennelse av innkallingen. |
| 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto. | 2. Valg av møteleder og referent. |
| 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.) | 3. Årsrapport (sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den). |
| 4. Jarkalkulo (same) | 4. Årsregnskap (sendes på samme måte) |
| 5. Ricevitaj proponoj*. | 5. Innkomne forslag*. |
| 6. Elekto de estraro*, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono,. Ĉiuj kun anstatŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono. | 6. Valg av styre*, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité. |

Neniu proponis statutŝanĝon ĝis la limdato, la 10a de januaro.

Aliaj proponoj atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno, do ĝis mardo la 10a de februaro (sem. 7).

* Vakas pluraj posten en la estraro. *Vi mangler folk til styret.*

Bv. sendi (sin)proponojn. *Send gjerne forslag – på deg selv eller andre.*

Interlingvistiko

En kelkaj niaj klubaj kunvenoj ni daŭrigas niajn diskutojn pri interlingvistikaj temoj, surbaze de la artikoloj de Federico Gobbo en Revuo *Esperanto*.

Ili aperis en la numeroj junia, julia/aŭgusta, septembra, novembra, decembra kaj januara respektive:

1. Interlingvistiko: unu vorto, multaj signifoj
2. La malfacila tasko klasifiki planlingvojn
3. La kunfluo de lingvoplanado kaj planlingvoj
4. La fratoj de Saussure kaj Esperanto
5. La praavoj de interlingvistiko: Kartezio kaj Lejbnico
6. Gloro kaj falo de Volapuko

Libroj de Tron Øgrim

Ni ricevis grandan kolekton de Esperantaj libroj, kiujn postlasis nia membro Tron Øgrim (1947 – 2007):

- lernolibroj, vortaroj, gramatikoj, esperantologio ...) $\frac{3}{4}$ bretometro
- fakliteraturo en E-o (plejparte geografio, historio, politiko ...) 1 m
- la E-movado $\frac{3}{4}$ bm
- beletro $2\frac{1}{2}$ bm

Sume \hat{c} 5 bretometroj (6 plenaj bretoj).

Librojn kiuj mankas en la deponejo de la Nacia Biblioteko en Mo i Rana ni sendos tien. Duoblaĵojn kiujn ni jam havas en Esperantonia ni povos sendi al triamondaj kluboj kaj aliaj kolektantoj. Dume ili estas prunteblaj.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj kaj konferencoj donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Lærebok for nybegynnere: Esperanto – den direkte metoden – basert på tegninger, Fotnoter og forklaringer på norsk. Egner seg ypperlig for selvstudium. **Norsk utgave 2012. 116 s. 45 kr.**

Flugoranĝo rakontas. Johan Galtung. Por infanoj, sed ne nur! broŝurita, kolore ilustrita. 90 kr. (Vidu recenzon en *N.E-isto* 1/2014.)

Lingvaj paĝoj. Elektitaj tekstoj el *Norvega Esperantisto* 1990–2005.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 3 aŭ 4 al Sinsen.
* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo@esperanto.no
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).